# *2017: pozitiva evoluo de la ekonomio*



Kiel tradicie, en la fino de ?iu jaro kunsidas la  nacia asembleo de la popola povo de Kubo, por revui la landan situacion rilate la ekonomion kaj ?iujn aspektojn de la socio. ?i- lastan jaron la parlamenta sesio okazis  en la Kongresa Palaco, tio estas efektivi?is  la oka periodo ordinara de sesioj de la oka le?ofaro, la? estis konvokite de la prezidanto de tiu organo.

La ministro de ekonomio Ricardo Cabrisas informis anta? la parlamentanoj ke la nacia malneta produkto interna de Kubo kreskis je 1,6% en la jaro 2017 spite al la pluraj malfacila?oj alfrontitaj dum la jaro. Inter la pli bonaj sektoroj kiuj influis tiun kreskon elstaras la konstruado, turismo, transporto kaj agrikulturo.

La estro de la konstanta komisiono por starigo kaj evoluigo de la gvidlinioj aprobitaj de la komunista partio kaj registaro, Marino Murillo, esprimis ke la cent politikoj aprobitaj estis funde analizitaj, sed la praktiko evidentigis ke la procezo estas tre kompleksa.

La komisiono dividis sian laboron en ok strategiaj prioritatoj, sed, komence, li emfazis pri kvar, ili estas, nome, la mona ordigo de la lando; la evoluigo de la socialista ?tata entrepreno; la integrala reviziado kaj plibonigo de la formoj de produktado ne ?tataj, tio estas, kooperativoj kaj memstaraj laboristoj, kaj alia rilatas al la temo kiel atingi pli da eksterlandaj investoj en Kubo.

Post analizo de la jara agado kaj la estontecon rilate la ekonomion kaj socian laboron en la insulo, la kuba prezidento Raúl Castro, atentigis ke en la jaro 2018 persistos la financaj stre?oj kaj la ekonomiaj defioj,

tamen prognozis ascendan vojon por la insula ekonomio.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/economia/151609-2017-pozitiva-evoluo-de-la-ekonomio

**Radio Habana Cuba**